# BULTENO
## DE LA INTERNACIA LABOR-OFICEJO

**Nº 24** **Novembro** **1927**

Aperas ĉiudumonate kiel aldono al „ESPERANTO“ ☆ Redaktejo: BUREAU INTERNATIONAL DU TRAVAIL, GENÈVE

TEKSTO: La Biblioteko de la Internacia Laboroficejo. — La Ĉeestantoj de la Internacia Labora Konferenco. — Nova Germana leĝo pri asekuro kontraŭ senlaboreco. — Sklaveco en Sierra Leone. — Salajroj en Ruslando. — Industria Higieno kaj Sendanĝereco en Ruslando. — Salajrataj Agrikulturaj laboristoj en Ruslando — Altaj salajroj en Usono. — La nivelo de klereco ĉe la laboristoj en Palestino. — Donaco de Sudslavujo. — La Internacia Laboroficejo kaj la oficistoj — La Internacia Laboroficejo kaj Usono. La Turka Prezidanto de la Komitato pri Eksterlandaj Aferoj vizitis la Dekan Kunsidon. — Progreso de la Internacia Labora Leĝdono.

## La Biblioteko de la Internacia Laboroficejo.

La utileco de la Biblioteko de la Internacia Laboroficejo pliiĝas de jaro al jaro. En 1925, ĝi enhavis 4447 volumojn, 6038 broŝurojn kaj 3820 periodajn eldonaĵojn. Je la fino de 1926, la ciferoj estis respektive 5330, 8029 kaj 6413, tio estas. tuta pliiĝo 5467 aŭ 38,7 procentoj.

Iuj reformoj estis faritaj en la organizo de la biblioteko dum la pasinta jaro, precipe, la sinsekvanta nombrado kaj registro de libroj kaj decimala sistemo de klasifiko. Plie, laŭ decido de la Kunveno de la Ligo de Nacioj, kompleta bibliografio de ĉiuj verkoj eldonitaj pri la Internacia Laboroficejo estis lasttempe eldonita. La preparo de presita katalogo ankaŭ estas komencita.

Krom tio unu servo pri Dokumentoj legas 2300 gazetojn kaj periodajn eldonaĵojn kaj eltranĉas notindaĵojn el ili. Listo de la periodaj eldonaĵoj ricevitaj de la Oficejo estis lasttempe eldonita kaj kompleta katalogo aperos post nelonge.

## La Ĉeestantoj de la Internacia Labora Konferenco.

La Internacia Laboroficejo eldonis interesajn ciferojn pri la partopreno de la diversaj ŝtatoj en la dek kunsidoj de la Internacia Labora Konferenco ĝis nun okazintaj.

La tuta nombro de delegitoj, teknikaj konsilantoj kaj sekretarioj ĉeestintaj la dek kunsidojn estas 1678, dum 52 ŝtatoj estis reprezentataj. La solaj landoj apartenantaj al la Ligo de Nacioj, kiuj ne ankoraŭ sendis delegitojn al la Konferenco. estas la Dominika Respubliko, Liberio kaj Nova Zelando.

La landoj sendintaj la plej multe da delegitoj estas la Brita Imperio (134), Japanujo (126), Italujo (110), Germanujo (108), Hispanujo (79), Belgujo (74) kaj Francujo (71).

Estas ankaŭ interesa fakto, ke ses reprezentantoj de diversaj landoj ĉeestis ĉiujn kunsidojn, nome: S-ro Arthur Fontaine (Francujo), S-ro Hodac (Ĉeĥoslovakio), S-ro Mannio (Finnlando). Monsinjoro Nolens (Nederlando), S-ro Sokal (Polujo) kaj S-ro Thorsen (Norvegujo). S-ro Hodac estas mastra reprezentanto, la kvin aliaj estas Registaraj reprezentantoj. Neniu laborista reprezentanto ĉeestis ĉiujn kunsidojn.

## Nova Germana leĝo pri asekuro kontraŭ senlaboreco.

Post longa preparado, komencita jam en 1919, kaj diversaj projektoj, el kiuj la lasta estis diskutita dum preskaŭ dek monatoj de la Ekonomia Konsilantaro kaj fine malakceptita kaŭze de la ekonomia krizo en 1923, aranĝo pri deviga asekuro kontraŭ senlaboreco fariĝis leĝo per decido de la Reichstag la 16-an de Julio 1927.

La Leĝo, kiu fariĝis efika de la 1-a de Oktobro, starigas sistemon de deviga asekuro, intime kunligita kun la laboro de la publikaj dungoficejoj, kaj ampleksante pli ol 16 000 000 laboristojn. La sistemo estas bazita sur kotizoj de la mastroj kaj la asekuritoj, kun la aldono, en periodoj de urĝa bezono, de publikaj subvencioj.

La leĝo starigas novan centran institucion por dungigo kaj asekuro kontraŭ senlaboreco, al kiu la ekzistantaj dungoficejoj estas submetitaj.

La asekuro provizos je kompenspagoj, helpo al senlaboruloj dum malsano kaj antaŭrimedoj kontraŭ senlaboreco.

Por ricevi kompenspagon, senlaborulo devas kapabli kaj deziri labori kaj esti asekurita dum 26 semajnoj en la jaro antaŭ sia postulo. Kompenso estas pagata maksimume dum 26 semajnoj ĉiujare.

La monrimedoj de la sistemo konsistas el egalaj kotizoj de la mastroj kaj la asekuritoj.

## Sklaveco en Sierra Leone.

Legantoj de la Bulteno memoros, ke en la N-ro 19 (Septembro 1926) ni aludis pri projekto de leĝo proponota en la Brita Protektorato de Sierra Leone, por modifi la tiaman leĝaron pri sklaveco. Tiu projekto poste fariĝis leĝo per la Ordono N-ro 9 de 1926. Rezulte el tiu Ordono kaj la leĝaro, kiun ĝi kompletigis, la situacio pri sklaveco en la Protektorato estas la jena.

Kiam la Protektorato estis kreita en 1895, sklaveco estis rajtigita per indiĝena leĝo kaj kutimo en la teritorio. La Leĝoj faritaj de la Protektanta Potenco malpermesas ĉiun komercon pri sklavoj, permesas al sklavoj aĉeti ilian liberecon, deklaras liberaj ĉiujn personojn naskitajn en la Protektorato aŭ kondukitaj tien, kaj ordonas, ke ĉiuj personoj traktataj kiel sklavoj aŭ tenataj laŭ iaspeca servuto fariĝos liberaj ĉe la morto de ilia mastro aŭ posedanto, kaj ke neniu postulo por aŭ pri la posedo de sklavo estos akceptata de iu el la juĝistaro de la Protektorato.

Oni vidos, ke ĉiuj sklavoj estos liberaj ĉe la morto de ilia nuna mastro kaj ke neniu mastro povas reposedi forkurintan sklavon per proceso en la juĝejo. Ĉu li rajtas rekapti lin? Granda surprizo sentiĝis en la tuta mondo, kiam, en Julio pasinta, la Superega Juĝistaro de la Kolonio Sierra Leone decidis jese, nuligante la decidon kontraŭ du sklavoposedantoj, kiuj perforte rekaptis forkurintajn sklavojn kaj estis kondamnitaj pro konspiro kaj perforto.

La plimulto de la Juĝistoj opiniis. ke, ĉe la starigo de la Protektorato, indiĝena leĝo kaj kutimo akceptis la rajton de la posedanto por rekapti forkurintan sklavon, kaj ke, ĝis kiam tiu rajto estos forigita per leĝo, ĝi restas efika. Se mastro rajtas rekapti sian forkurintan sklavon, la mastro, kiu efektivigas tiun rajton, uzante nur moderan forton kaj ne vundante sian sklavon, ne faras ion kontraŭleĝan.

Unu juĝisto malkonsentis al tiu decido.

En la Sesa Komisiono de la Oka Kunveno de la Ligo de Nacioj, D-ro Nansen atentigis pri tiu decido.

Kavaliro E. Hilton Young, delegito de la Brita Imperio, diris, ke la decido malkaŝis mankon en la loka leĝaro, kiu surprizis la Imperian Registaron, ke speciala kunveno de la leĝdonistaro jam estas kunvokita kaj ke la bezona leĝo estos sendube rapide farata.

## Salajroj en Ruslando.

Depost la printempo de 1926 fariĝis evidente, ke, malgraŭ la pliiĝo de vivkosto, neniu ĝenerala pliigo de salajroj estas ebla. La 18-an de Aŭgusto 1926, la Soveta Registaro starigis komitaton, por konsideri, ĝis kiom kaj en kiuj industrifakoj oni povus pliigi salajrojn dum la financa jaro 1926—1927.

Post longa diskuto la komitato prezentis projekton, kiun la Registaro aprobis, laŭ kiu, de la 1-a de Oktobro 1926 al la 30-a de Septembro 1927, la Ŝtato elspezos ĉirkaŭ 200 milionojn da rubloj, por pliigi salajrojn. Tiu sumo obligos modifon de salajroj nur por tiuj laborantoj kies gajnoj estas plej malsupre de la ĝenerala mezo, precipe ministoj, laboristoj en iuj fakoj de la metalurgio, en la fervojoj kaj en la poŝta, telegrafa kaj telefona servoj.

„Informations sociales" (Industrial and Labour Information), la semajna eldonaĵo de la Internacia Laboroficejo, enhavas detalajn sciigojn pri ĉi tiu temo.

## Industria Higieno kaj Sendanĝereco en Ruslando.

Tutrusa Kongreso pri Industria Higieno kaj Sendanĝereco lasttempe okazis en Moskva. La „Informations sociales" (Industrial and Labour Information), la ĉiusemajna eldonaĵo de la Internacia Laboroficejo, publikigis, el oficialaj fontoj, tre interesajn sciigojn pri la nuntempaj kondiĉoj en Ruslando.

Laŭ la Centra Statistika Servo, de 10 al 12 procentoj el la industriaj laboristoj faras ekstran laboron, kies meza daŭro estas po 15 ĝis 18 horoj monate por ĉiu laboristo. Ne ĉiu tiu ekstra laboro estas permesata de la Inspektoraro. Dum unu kvaronjaro en 1926, la Inspektoroj permesis 8 milionojn da horoj en iuj industrioj kaj oficialaj statistikoj por la samaj industrioj raportis de 10 al 12 milionojn da horoj. La Inspektoroj atentigis pri multaj malobeoj de la reguloj pri ĉiusemajna ripozo kaj ĉiutagaj ripozoj.

Kontraŭe la reguloj pri jaraj ferioj estas pli akurate obeataj. La meza daŭro de jaraj ferioj estis 10,3 tagoj en 1922, 12,7 en 1923, 12,9 en 1924 kaj 14 en 1925 kaj 1926. En iuj industrioj la meza daŭro estas eĉ pli longa. Ekzemple, en la presa industrio, ĝi estas 22,4 tagoj, en la tabakindustrio 17,4 kaj en la teksindustrio 17,2.

La reguloj pri virinoj kaj infanoj estas ĝenerale obeataj, sed la nombro de akcidentoj pligrandiĝas. Dum la tria kvaronjaro de 1925 okazis po 19,4 akcidentoj por 1000 laboristoj, en la kvara kvaronjaro po 19,8, en la unua kvaronjaro de 1926 po 23,3, en la dua kvaronjaro po 26,3 kaj en la tria kvaronjaro po 28,2. Tiu pligrandiĝo estas grandmezure kaŭzata de la difekta stato de konstruaĵoj kaj iloj. Inspektoroj atentigas pri la aĝo de la konstruaĵoj kaj la difekteco de plankoj kaj intermuroj en 46 procentoj de la establoj, pri nesufiĉa ventolado en 35 procentoj, kaj pri netaŭga lumigo en 28 procentoj. La specialaj inspektoroj de fornegoj raportas, ke pli ol la duono de la fornegoj estas uzataj jam de pli ol 25 jaroj, kiu estas la norma daŭro. Oni anstataŭigas ilin nur malrapide.

Centraj kaj lokaj komitatoj estas starigataj por kontraŭbatali la akcidentojn. Specialaj monsumoj estas asignitaj por la teknika plibonigo de iloj laŭ la vidpunkto de sendanĝereco. La tuta elspezo por tiu celo en 1924 kaj 1925 estis 18,4 milionoj da rubloj, tio estas ĉirkaŭ 2 procentoj de la salajroj pagitaj.

## Salajrataj Agrikulturaj laboristoj en Ruslando.

La dungo de salajrataj agrikulturaj laboristoj, kiu estis oficiale, se ne fakte, malpermesata en Ruslando dum la komunista periodo, estas denove permesata jam de du jaroj. Laŭ raportoj de la Rusa Centra Statistika Oficejo kaj la Centra Komitato de la Sindikato de Agrikulturaj kaj Arbaraj Laboristoj, raportoj cititaj en „Informations sociales" (Industrial and Labour Information), la ĉiusemajna eldonaĵo de la Internacia Laboroficejo, la nombro da agrikulturaj kaj arbaraj laboristoj estas nun ĉirkaŭ 5 000 000, aŭ 7,2 procentoj de la tuta kampara loĝantaro.

La laborkondiĉoj de tiuj laboristoj estas tre diferencaj, praktike kaj leĝe, de tiuj de la industriaj laboristoj. Generale, la Kodo pri Laboro ne ampleksis la agrikulturajn laboristojn, kun escepto de tiuj okupataj en grandaj establoj havantaj industrian karakteron.

Tamen en 1925 la Konsilantaro de Komisaroj de la Popolo eldonis „Provizorajn regulojn pri la dungo de helpa laboristaro en agrikulturo", regulojn, kiuj estas ankoraŭ efikaj. Tiuj reguloj pritraktas, interalie, la devon fari skribitajn laborkontraktojn, la registradon de tiaj kontraktoj, laborhorojn kaj ripozojn, la protekton de virinoj kaj infanoj, salajrojn, socian asekuron, kaj kuracadon.

La reguloj pri skribitaj kontraktoj ne estas rigore obeataj. Tiel, en la Uralo, 37,9 procentoj de la salajruloj en malgrandaj farmobienoj kaj 81,2 procentoj de tiuj en grandaj establoj estas dungataj per parolaj kontraktoj.

La daŭro de la laboro laŭ la skribitaj kontraktoj estas ĝenerale: ok horoj tage ĝis la 1-a de Julio, 11 horoj de la 1-a de Julio ĝis la 15-a de Septembro, kaj 7 horoj de la 15-a de Septembro ĝis la fino de la servado.

Agrikulturaj laboristoj estas pagataj jen per mono, jen per naturajoj. Tamen, la du pagometodoj ĝenerale fariĝas kune.

Kun escepto de la ŝafistoj, agrikulturaj laboristoj estas plejofte loĝataj kaj nutrataj de la mastroj. Vilaĝaj ŝafistoj estas ĝenerale loĝataj vice de la diversaj posedantoj.

La agrikulturaj laboristoj havas nuntempe sindikaton kun 1 100 000 membroj (inkluzive arbaraj laboristoj) kaj 7 400 aliĝantaj komitatoj.

## Altaj salajroj en Usono.

La Internacia Laboroficejo jus eldonis raporton de ĝia Vicdirektoro, S-ro Butler, pri Industriaj Rilatoj en Usono.

Unu el la plej interesaj ĉapitroj en tiu libro pritraktas la doktrinon pri altaj salajroj. El la sciigoj kolektitaj S-ro Butler kalkulas, ke la valoro de la manufakturaĵoj de Usono pliiĝis je 149 procentoj dum la lastaj dek jaroj, sed ke salajroj pliiĝis eĉ plie (175 procentoj). La meza valoro produktita ĉiujare de ĉiu laboristo plialtiĝis de 3447,84 dolaroj al 6892,93 dolaroj, dum la meza jara salajro pliiĝis de 579,14 dolaroj al 1253,93 dolaroj.

Plene kunkalkulinte la pliiĝon de la vivkosto dum la sama periodo, oni povas konkludi, ke la aĉetpovo de salajroj pliiĝis je 37,1 procentoj. Certe la vivnivelo de la laboristoj estas plej alta en la plej bone organizitaj metioj. Tamen estas sendube, ke okazis ĝenerala plialtiĝo de la prospero de la laboristaro en Usono kune kun pliiĝanta produktado.

S-ro Butler diras:

„Usonaj mastroj nun ĝenerale esprimas la opinion, ke altaj salajroj estas profitaj, kiel instigo al produktado, kiel kaŭzo de pli bonaj sentoj ĉe la laboristoj, kaj ankaŭ tial, ke ili kreas ĉe la salajruloj aĉetpovon, kiu nutras kaj subtenas prosperon. La pago de bonaj salajroj certe produktis tiujn rezultatojn, sed se oni imagus, ke la meza Usona mastro intence akceptis politikon favoran al altaj salajroj, tial ke li antaŭvidis tiujn rezultatojn, oni supozus en li antaŭvidon, kiun li ne povus pretendi. Estas ja vero, ke S-ro Henry Ford starigis minimuman salajron de 5 dolaroj por okhora tago jam en Januaro 1914. Tiel farante, li radikale deflankiĝis de la tiam kutimaj salajroj kaj kaŭzis grandan maltrankvilecon kaj proteston ĉe liaj konkurantoj. Li faris tion, laŭ sia propra klarigo, tial, ke li opiniis, ke ĝi estas bona negoco, kaj li trovis ĝin „unu el la plej bonaj kostmalpliiĝantaj procedoj, kiujn ni iam faris." Tamen lia ago estis escepta kaj ne estis ĝenerale imitita. Do la lasttempa pliiĝo de salajroj povas esti atribuata al la ekonomiaj kaŭzoj antaŭe priskribitaj, kaj ne al intencita politiko. Tamen, oni trovis, ke altaj salajroj kunportas kompensojn, kiujn oni ne konjektis. Estas sendube, ke ilia efiko kiel stimulo kaj al produktado kaj al konsumado estis plibone komprenita de la mastroj ol iam antaŭe. La fakto, ke multaj miloj da laboristoj posedas

superreston super la nuraj vivnecesajoj signifas pliigitan postuladon por ĉiuspecaj komercaĵoj, alivorte, pli konstantan merkaton kaj stimulon al plia produktado. Pro tiuj motivoj, la principo estas nun larĝe akceptita ĉe Usonaj mastroj, ke estas bona politiko eviti laŭeble la malpliigon de salajroj, ke laŭpeca salajro por la sama laboro devas ne esti malaltigita, kaj ke oni devas serĉi ŝparrimedojn ĉie alie, antaŭ ol tuŝi salajrojn.

## La nivelo de klereco ĉe la laboristoj en Palestino.

La semajna eldonaĵo de la Internacia Laboroficejo „Informations sociales" (Industrial and Labour Information) publikigas la rezultatojn de enketo pri la nivelo de klereco ĉe la Judaj laboristoj en Palestino. El la tuta laborista loĝantaro, 31 821 personoj, 1 058 estas ricevintaj universitatan instruadon, 9 715 estas edukitaj en duagradaj lernejoj, 7 217 en unuagradaj lernejoj, 5 257 en religiaj lernejoj, kaj 264 ĉeestis profesiajn kursojn.

La plej granda nombro da laboristoj edukitaj en duagradaj lernejoj troviĝas en agrikulturaj entreprenoj kaj la plej granda nombro da malkleruloj inter la urbaj laboristoj.

## Donaco de Sudslavujo.

La Delegitaro de la Regno de la Serboj, Kroatoj kaj Slovenoj al la 8-a Kunveno de la Ligo de Nacioj, sub la prezido de S-ro Kumanudi, ministro de Publika Instruado, vizitis la Internacian Laboroficejon, la 27-an de Septembro 1927, por prezenti oficiale al la Direktoro la donacon de ĝia Registaro al la Oficejo.

La donaco konsistas el belega meblaro laŭ malnova Serba stilo, kies desegnoj es'as ĉiuj inspiritaj de ornamaĵoj de mezaĝaj Serbaj monaĥejoj.

## La Internacia Laboroficejo kaj la oficistoj.

Lastan Septembron okazis en Montreux internacia konferenco iniciate de la Federacio de Svisaj Societoj de Oficistoj. Ĉeestis reprezentantoj de internaciaj organizaĵoj de oficistoj de ĉiuj skoloj: „liberaj", Kristanaj, sendependaj ktp. La Konferenco starigis programon celantan la protekton de komercaj kaj industriaj oficistoj per internacia reguligo.

Tiu programo estas komunikita al la Internacia Labor-Oficejo, kiu jam elektis el ĝi iujn demandojn por ekzameno, en la celo konsideri ĉu ili povus esti enmetataj en la tagordon de estonta kunsido de la Internacia Labora Konferenco.

Estas ankaŭ decidite, ke la Oficejo faru du dokumentajn enketojn: unu pri la frufermado de butikoj, demando intime ligata kun tiu pri laborhoroj; la alia pri protekto de la rajtoj de oficistoj rigarde iliajn proprajn elpensaĵojn.

Fine, laŭ insista peto de la koncernataj organizaĵoj, du oficistoj de la Oficejo estas speciale komisiataj, por sin okupi pri demandoj interesantaj privatajn kaj publikajn oficistojn.

Konvenas memori, ke la pliparto de la Projektoj de Konvencioj kaj Rekomendoj jam akceptitaj de la Internacia Labora Konferenco koncernas oficistojn same kiel laboristojn. Tio estas la fakto, ekzemple, pri la Projektoj de Konvencioj aŭ Rekomendoj pri senlaboreco, akuŝo, kompenso pro profesiaj malsanoj kaj akcidentoj, egaleco de traktado pri kompenso pro akcidentoj, inspekto de elmigrantoj, egaleco de traktado de eksterlandaj laboristoj, elmigrado, laborinspektado kaj utiligo de libertempo. Krom tio, speciala rekomendo pri semajna tagripozo en komercaj establajoj estis akceptita en Genève en 1921.

Tamen laboristoj en nemanaj profesioj multfoje esprimis ilian deziron, ke la Konferenco diskutu demandojn de speciala intereso por ili. Ekzemple, iuj delegitoj al la kunsido en 1925 proponis rezolucion, ke la laborkondiĉoj de privataj oficistoj estu enmetataj en la tagordon de la sekvonta kunsido. Tamen, la propono ne estis definitive prezentata al la Konferenco, kaj la afero estis delasita. En tiu okazo, la estraro de la Konferenco decidis, ke la laborkondiĉoj de priva'aj oficistoj estas en la kompetenteco de la Internacia Labora Organizaĵo.

## La Internacia Laboroficejo kaj Usono.

La solaj gravaj landoj, kiuj ne estas membroj de la Internacia Labora Organizaĵo, estas Usono, Meksikio, Rusujo, Turkio kaj Egipto.

„La foresto de Usono", diras la Direktoro de la Internacia Laboroficejo en sia raporto al la Deka Konferenco, „estas ĉiam bedaŭrinda, ne tial, ke ĝia foresto influis la disvolviĝon de la Organizaĵo, kiu, dum la lastaj sep jaroj, sen la partopreno de Ameriko, organizis ĝian taskon de kolekto kaj disdono de informoj tra la tuta mondo, realigis utilajn sociajn reformojn kaj akiris nepridiskuteblan moralan aŭtoritaton; sed tial, ke tiu vasta lando, kun ĝiaj 120 milionoj da loĝantoj, faras en la ekonomia kaj industria kampo plurajn eksperimentojn kaj novajojn, kiuj klare havus pli tujan valoron por la progreso de la homaro, se Usono estus membro de la Internacia Labora Organizaĵo."

Kvankam la oficiala situacio ne ŝanĝiĝis, aktiva kunlaborado fariĝis, dum la pasinta jaro, inter la Oficejo kaj diversaj Usonaj institucioj.

Unue, ni devas aludi la studadon pri migrado ĝis 1920, faritan laŭ peto kaj kun la monhelpo de la Nacia Oficejo de Ekonomia Esplorado (National Bureau of Economic Research). Due, laŭ konsento inter la Oficejo kaj la XXth Century Fund (Fondaĵo de la XX-a Jarcento) stariĝis Internacia Instituto pri Administrado. Trie, por instigi pli intiman kunlaboradon inter mastroj kaj laboristoj kaj certigi ilian ekonomian kaj materialan progreson, la Kompanio de Konsilantoj pri Industriaj Interrilatoj (Industrial Relations Counselors Inc.) nomis spertulon pri internaciaj rilatoj por kunlabori kun la personaro de la Internacia Laboroficejo.

## La Turka Prezidanto de la Komitato pri Eksterlandaj Aferoj vizitis la Dekan Kunsidon.

Dum la Deka Kunsido de la Konferenco, la Prezidanto bonvenigis Lian Ekscelencan Moŝton Ŝukri Kaja Bejon, Prezidanto de la Komitato pri Eksterlandaj Aferoj de la Turka Parlamento, kiu ĉeestis la Konferencon, kiel observanto por la Turka Respubliko.

„Rilatoj estas jam komencitaj", diris la Prezidanto, „inter la Internacia Labora Organizaĵo kaj la Turka Registaro, kaj la vizito de Lia Ekscelenca Moŝto estas unu paŝo antaŭen . . . Mi estas certa, ke ĉiuj membroj de la Konferenco deziros al la Turka Registaro la plej bonajn rezultatojn pri la preparo de ĝia kodo pri laboro. Ni estas tre interesiĝintaj pri la priskribo, en la Raporto de la Direktoro, de la klopodoj farataj de la Turkaj Registaro kaj Parmento por la plibonigo de la kondiĉoj de agrikulturaj laboristoj en Turkujo."

Lia Ekscelenco Moŝto Ŝukri Kaja Bejon respondis dankante kaj esprimis la intereson de la Turka Registaro pri internaciaj problemoj kaj precipe pri la laboroj de la Konferenco.

## Progreso de la Internacia Labora Leĝdono.

### Novaj konfirmoj de Konvencioj.

La Ministro de Eksterlandaj Aferoj de Nederlando registris ĉe la Generala Sekretariejo de la Ligo de Nacioj la dokumentojn pri konfirmo de la jenaj tri Konvencioj:

1. pri egaleco de traktado por naciaj kaj eksterlandaj laboristoj pri kompenso pro akcidentoj (akceptita de la Internacia Labora Konferenco en ĝia 7-a kunsido, Genève 1925).

2. pri kompenso pro laborakcidentoj (akceptita en la sama kunsido).

3. pri simpligo de la inspekto de elmigrantoj surŝipe (akceptita en la 8-a kunsido, Genève 1926).

La Finna Registaro ĵus informis la Internacian Labor-Oficejon, ke ĝi registris ĉe la Sekretariejo Generala de la Ligo de Nacioj konfirmon de du konvencioj akceptitaj de la Konferenco, nome: Tiu pri egaleco de traktado por naciaj kaj eksterlandaj laboristoj pri kompenso pro akcidentoj kaj tiu pri kompenso pro profesiaj malsanoj.

Krom tio, la Brita Registaro konfirmis la konvencion pri simpligo de la inspekto de elmigrantoj surŝipe, kondiĉe, ke tiu konfirmo efikos nur kiam la konvencio estos konfirmita de Francujo, Germanujo, Italio, Norvegujo kaj Hispanujo.

